

la verda stelo



ESPERANTO
NEDERLAND

SEKCIO GRONINGEN-DRENTE
&
FRISA ESPERANTISTA RONDO

aprilo 2006



LA VERDA STELO

eldono de

ESPERANTO NOORD-NEDERLAND

ESPERANTO-KLUBO GRONINGEN-DRENTE

prezidanto

s-ro J.B. Swenker

T.W.S. Mansholtstraat 25

9728 MC Groningen

tel. +3150 527 45 72

retadreso: johan.swenker@xs4all.nl

sekretario

s-ino W. van Ganswijk-Vlasblom

Huygensstraat 27

9727 JA Groningen

tel. +3150 525 00 86

retadreso: wvganswk@xs4all.nl

kasisto

s-ro L. Staghouver

Julianalaan 25

9781 ED Bedum

tel. +3150 301 40 15

retadreso: luitstaghouver@home.nl

FRISA ESPERANTISTA RONDO

s-ro W. Akkerman

Westerein 14 a

8571 GB Harich (Frl)

tel. +3151 460 22 72

retadreso: wiebrenakkerman@hetnet.nl

kunvenejo

Dreesflat, W. Dreesstraat 1

ĉiun alternan ĵaŭdon ni kunvenas

de la 19h45 ĝis la 21h45

Esperanto-centro

T.W.S. Mansholtstraat 25

9728 MC Groningen

J.B. Swenker, tel. +3150 527 45 72

redakcio

Koos Scharroo

Wil van Ganswijk-Vlasblom

retpoŝto: laverdastelo@pingveno.nl



Enhavo

3 ... Malferme

4 ... Klubvesperoj, naskiĝdatrevenoj

5 ... Kasista alvoko

6 ... Kio pri la nordo?

9 ... Luit korespondas...

Contributie afdeling Groningen-Drente 2006

Afdelingslid (incl. abonnement LA VERDA STELO) € 11,34

Gezinslid € 5,67

Donateur (minimaal) € 5,67

Abonnement LA VERDA STELO € 5,67

Over te maken op Postbanknr. **3822472** t.n.v. afd. Groningen, ESPERANTO NEDERLAND te Bedum

Leden van afd. Groningen-Drente worden geacht lid te zijn van **ESPERANTO NEDERLAND**


Vandaar dat wij hier ook het gironummer ervan vermelden:

Postbanknr. **375522** t.n.v. ESPERANTO NEDERLAND te Heerhugowaard

Lidmaatschap (incl. abonnement FEN-X) € 27,50

Gezinslid € 8,00

Malferme



Kial nova nomo?

Respektive en novembro 1925 kaj 1926 fondiĝis Esperanto-kluboj en Groningen kaj Leeuwarden: *Esperanto-klubo de Groningen kaj Drente* kaj *Frisa Esperantista Rondo* (FER). Jam dum multaj jaroj estas bonaj kontaktoj inter ambaŭ sekcioj de Esperanto Nederland. Zamenhof-tagon en decembro ni dum multaj jaroj alterne organizis kaj vizitis unu la alian.

La lastajn jarojn la maljuniĝo de multaj membroj estas por ili malhelpo regule viziti klubkunvenon. Krome, la pli granda parto de la membraro, almenaŭ tiu de Frislando, loĝas dise en la provinco kaj ne povas aŭ volas partopreni klubkunvenon ĉiudusemajne.

Intertempe la rolo de Interreto tre grandiĝas. La socio ŝanĝiĝas. Multaj organizoj emas al pligrandigo laŭskala por fortigi sin.

Koncize kaj unuvorte: estas tempo ankaŭ por Esperanto-kluboj rekonsideri sian strategion. Tial decidis sekcio Groningen-Drente kaj FER en februaro kune prezenti sin *Esperanto Noord-Nederland* al la membroj kaj al la ekstera mondo. Kiel ilo por informi vin pri klubvesperoj, programoj, ekskursoj ktp. funkcios la renovigita bulteno *La Verda Stelo*.

Kunvenejo (r)estas Dreesflat, W. Dreesstraat 1, Groningen (apud Hoornse Meer).

Ĉiun alternan jaŭdon de 19h45 ĝis 21h45 vi estas kore bonvena.

Sekretariejo estas en Huygensstraat 27, 9727 JA Groningen, tel. 050 – 525 00 86.

Ni esperas, ke vi partoprenos la aranĝojn multnombro kaj tiel subtenos la agadon de la kluboj.

La estraroj

Klubkunvenoj

aprilo

- 6 gastpreleganto: **Sylvain Lelarge** -
20 senfadenaj retoj

! ATENTU !
komenco: 18h45

majo

- 11 (anstataŭ 4, pro memortago!) kvizo
18 kune manĝi je la 19-a
picejo // Lago, S.O.J. Palmelaan 305, Groningen

septembro

- 7 ferioj

SOMERAJ RENKONTIĜOJ

je la 10-a horo matene

junio

- 29 Scandinavisch dorp
Oude Badweg 1, Eelderwolde

aŭgusto

- 3 Schimmelpenninckhuis
Oosterstraat 53, Groningen

Naskiĝtagoj

majo

- 7 G.C. Boer
11 J. Hennekam-Tijs
31 J. W. Moonen

junio

- 1 A.M. Oosterwijk-Dominicus
24 J. Snoek
24 Wim Rijnders
30 H. van Dalen

julio

- 20 H. Smith

aŭgusto

- 14 J. Reddingius
16 Koos Scharroo
30 Johan Swenker

septembro

- 3 Wiebren Akkerman
17 H.W.T. van Hogen-Cornelissen
24 A.E. van der Heij-Alblas
26 G.M. van Reenen
30 A.H. Thomas-Nitzsche

Ni gratulas..

oktobro

- 3 D. van der Heijden
15 C.H.T. Behr-Kunst
29 A.M.H. Dodebier
30 P. van der Vlis

Alvoko de via kasisto


Ĉu kasisto sur la genuoj?

Se vi intertempe jam pagis vian kotizon por la jaro 2006, neniel havas sencon legi ĉi tiun tekston. Sed se vi ne jam pagis, vi nepre legu ankaŭ la daŭrigon de ĉi tiu peto.

Same kiel vi, ankaŭ la klubo ne povas ekzisti sen enspezoj. Vi scias, ke ne necesas fari al si zorgojn pri la forrestado de elspezoj. Kutime pagendaj fakturoj ne atendigas vin longe. Al via kasisto ne plaĉas preterlasi la pagon.

Mi esperas, ke vi havas pli-malpli la saman opinion pri pagendaj sumoj, precipe pri la kluba kotizo. Sed se vi havas alian opinion, mi tamen petas de vi, kara membro, kara abonanto, ne plu prokrasti la pagon de la modesta sumo, kiu estas la kotizo. La aferkoncernaj informoj troveblas sur la interna flanko de la kovrilo.

*Anticipe dankas vin
la kasisto*



Smeekbede van een penningmeester?

Nee, beslist niet. En zij die hun contributie voor het jaar 2006 al hebben betaald, kunnen het vervolg van dit stukje voor kennisgeving aannemen of zelfs overslaan. Maar als je de contributie voor dit jaar nog niet hebt betaald, dan word je vriendelijk verzocht ook het vervolg van dit verzoek te lezen.

Onze club lijkt in sommige opzichten wel een beetje op een doorsnee gezin. De diverse gezinsleden hebben verschillende eigenschappen: de een is wat actiever dan de ander en ook wat de financiën betreft, zijn ze niet allemaal gelijk. Een enkeling is jaren vooruit, anderen voldoen keurig op tijd aan hun verplichtingen, maar er zijn er ook die met aanzienlijk meer moeite kunnen scheiden van hun dierbare euro's. Deze spaarzaamheid is niet per definitie een slechte eigenschap, maar ik zou het niet vervelend vinden om ook van deze laatste groep binnenkort een betaling te ontvangen. Alle relevante gegevens daartoe zijn te vinden op de binnenkant van de omslag. Alvast mijn hartelijke dank.

De penningmeester

Kio pri la nordo?

la 15-an de decembro 2005

Ni havis budon en la Immanuel-preĝejo la 10-an de decembro. Kiel kutime estis pli da esperantistoj malantaŭ la budo ol scivo-lemuloj antaŭ ĝi. La homoj, kiuj venis, vidis kaj aŭdis almenaŭ, ke Esperanto ankoraŭ ekzistas.

Wil ricevis du leterojn de Dennis, kiu loĝas kaj laboras en Ugando nuntempe. Li sendis retan kaj paperpoŝtan leterojn.

La klubo ricevis leteron oficialan de *Frisa Esperantista Rondo*. La estraro de *FER* proponas kunlabori kun nia klubo. Ni jam faras, sed nun *FER* volas tion oficialigi. Ni priparolos tion dum nia jarkunveno.

La temo de la vespero ne estis *gramatiko*. Ni tamen aŭdis, kiel oni uzu la vorteton *ja*. Ĝi estas emfaza vorto, kiu insistas pri la vereco de la diraĵo. *Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko* (PMEG) je <http://bertilow.com/pmeg> eksplikas pli pri tiaj gramatikaj aferoj.

La temo estis *Zamenhof*. Estis ja la 15-a de decembro. Ni voĉlegis teatraĵon, kiun Wil iam verkis por sia junulgrupo. La teatraĵo pritraktas la vivon de Zamenhof. Estas multaj personoj en la teatraĵo, ekzemple kaj la juna kaj la plenkreska Ludoviko, lia patro kaj liaj amikoj. Tio signifis, ke ĉiu ludis multajn rolojn. Hazarde, Koos tial devis voĉlegi preskaŭ la tutan unuan akton.

la 12-an de januaro 2006

Luit raportis pri la ekskurso al Oldenburg (la 17-an de decembro). Ni iris tien sepo. Post bonvenigo kun kafo, ni unue vizitis la kastelon de Oldenburg. Kompreneble ni ne estis la solaj partoprenantoj: ĉeestis esperantistoj ankaŭ de la kluboj de Bremen kaj Unterweser. Pro tio ni pli ol dudekope iris aŭtobuse al la kastelo. Tiu konstruaĵo estas muzeo nuntempe. Pere de germanlingva gvidado kun “esperantling-

va subtitolado” ni eksciis multon pri la multeventa kaj interesa historio de la kastelo kaj ĝia loĝantaro.

Post la gvidado ni vizitis ankaŭ la kristnaskan foiron. Montriĝis, ke ni ne estas la solaj nederlandaj vizitantoj. Ĉe dekoj da budoj oni povis aĉeti ĉion ajn por ornamo ne nur la kristnaskan arbon. Preterpasante la budojn, oni flaris *Kristnaskon*, precipe varmajn manĝaĵojn kaj trinkaĵojn.



Poste ni reiris piede al nia gastigantino, kaj ni estis denove regalataj per pluraj bongustaĵoj. Pro la vintra vetero ni adiaŭis iom pli frue ol planite, por ke ni ĉiuj revenu hejmen je deca tempo.



**Grafo Anton Günther (1583-1667),
loĝanto de la oldenburga kastelo**

Estis plezuro partopreni ĉi tiun bone organizitan Zamenhof-tagon en Oldenburg.

Wil ricevis kelkajn leterojn, inter aliaj de fratino de Lies Broekema, en kiu ŝi petis kopion de la afablaj vortoj, kiujn Wil diris okaze de la adiaŭa soleno en la preĝejo de Noordlaren.

Ŝi ricevis leteron ankaŭ de juna viro, kiu lernas Esperanton. Unue li finis kurson, kaj nun li studas vortaron. Li starigis demandojn pri kelkaj Esperantaj vortoj. Inter aliaj: kio estas la diferenco inter *abceso* kaj *absceso*? Ambaŭ vortoj troviĝas en la malnova Prisma-vortaro, laŭ kiu *abceso* estas la traduko de la nederlanda vorto *abces*. En la parto Esperanto-nederlanda *abceso* ne estas, ĉar temas pri prezeraro. La ĝusta traduko de *abces* estas *absceso*. Wil respondos la leteron.

Kvankam la programo de ĉi tiu kunveno estis *vivanta gazeto*, ni kaptis la okazon por pli profunde preparoli la estontan kunlaboron, proponitan de la frisaj esperantistoj, inter nia klubo kaj la Frisa Esperantista Rondo. *FER* ne estas aktiva nuntempe, nek estas kluba informilo. Se ni decidus pozitive pri kunlaboro, tiam la informilon *La Verda Stelo* ricevos ankaŭ la esperantistoj, kiuj loĝas en Frislando. Kuna ekskurso en Frislando estas alia eblo por plivigligi la frisan Esperanto-agadon. Estas daŭrigota.

la 26-an de januaro 2006

Luit rakontis pri siaj novaj korespondokontaktoj kaj pri juna persono en Kongo, kiu vivas nun en Sud-Afriko kaj ŝatas eldoni libron pri siaj malagrablaj travivaĵoj, estante rifuĝinto. (Vidu: *Luit korespondas...*)

Luit kaj Monika faris denove tre belajn fotojn, kiuj tre taŭgos interalie por la frontopaĝo de *La Verda Stelo*.

Sekvis malgranda diskuto pri la uzo de la prefikso *ge* antaŭ nevira vorto, ekzemple *esperantisto*. Ankaŭ pri la vorto *amiko* ni parolis. Ĉu *amiko* estas viro? La angla *friend* povas esti viro aŭ virino. Akademia

komisiono, kiu komentis kursojn de *www.lernu.net* el lingva vidpunkto, rekomendas uzi *amikino* ĉie, kie temas pri virino.

Wil voĉlegis leteron el Bulgario pri la tiea nuntempa Esperanto-situacio, kiu, same kiel la vivcirkonstancoj, ne estas favora.

Ineke regalis nin pro sia naskiĝdatreveno kaj rakontis, ke ŝi ricevis en januaro jam 40 informpetojn pere de la ttt-paĝo *gratis.nl*.

En la revuo *Judaica Bulletin* staras du bonaj artikoloj pri Esperanto kaj pri la rilato inter Zwolle kaj Zamenhof.

La temo de la vespero estis *gramatiko*. Koos disdonis folion kun 25 solvendaj gramatikaĵoj. Ĉu vi scias, kial la frazo *Mi naskis mian filon la 31-an de septembro* ne estas bona? Montriĝis insida demando, ĉar septembro havas nur 30 tagojn!

Ni finis la kunvenon iom parolante pri la jarkunveno, kiu okazos la venontan fojon.

la 9-an de februaro 2006

Okazis nia jarkunveno. Kiel ĉiam, tiu estis ankaŭ normala klubkunveno, kio signifas, ke ni multe babilis.

Post jaroj, dum kiuj la kotizo restis 25 guldonoj, ni finfine decidis plialtigi la kotizon por la jaro 2007 al 12,50 eŭroj. Samejmanoj pagos la duonon. La kotizo por abonantoj kaj donacantoj plialtiĝos al 7 eŭroj. Unuflanke la buĝeto montras deficiiton, aliflanke kostas *La Verda Stelo* iom pli ol estis antaŭvidite. Sed ĝi tion vere meritas.

Wim Rijnders kaj Ineke Emmelkamp estis nomumitaj nova kaskontrolkomisiono, kaj Koos Scharroo estos anstataŭanto.

Ni kunlaboros kun Frisa Esperantista Rondo, uzante la nomon *Esperanto Noord-Nederland*. Ekde nun ricevos *La Verdian Stelon* ankaŭ la membroj de *FER*. (vidu *Malferme*). Por la jaro 2006 *FER* subvencias la frisajn esperantistojn, tiel ke tiuj povos ricevi la informilon. Nek en

Frislando, nek en Groningen do estos ŝanĝoj financaj.

La estraro denove ne ŝanĝiĝis.

la 23-an de februaro 2006

En antaŭa kunveno temis pri gramatiko. Unu el la kompletigendaj frazoj estis *Se mi malbone ekzameniĝos, mi ne ... ricevi mi-an diplomon*. Ni devis elekti inter *scios* kaj *povos*. Ni kune miris pri la 'ĝusta' respondo *scios*. Montriĝis, ke Koos iomete 'strabis' (fuŝlegis), kiam li kopiis la tekston. La ĝusta respondo al tiu tasko tamen estas *povos*.

Kelkaj interesaj retpaĝoj estas:

www.tekstoj.nl/esperanto/artikoloj/stumblijoj.htm pri *falsaj amikoj* kaj pri aliaj lingvaj stumblijoj (en la nederlanda lingvo) kaj *homonimoj* (homoniemen).

Temas pri *homonimoj*, se vorto havas pli da signifoj: *aanbieden = prezenti, proponi, enmanigi, oferti*.

www.lernu.net. Tie troviĝas inter aliaj la kursoj *Ana Pana* kaj *Ana renkontas...*, kiujn antaŭ nelonge lingve reviziis speciala komisiono de la Akademio de Esperanto.

www.home.nl. Musklaku sinsekve *Handig* kaj *Taalcursus* sub *Zoek-en-vind*. Sur la ekrano tiam eblas elekti inter dekoj da lingvokursoj, inter ili Esperanto.

La pli intensa kunlaboro inter *Frisa Esperantista Rondo* kaj *sekcio Groningen-Drente* spertis unuan sukceson: esperantisto, kiu intencis eksmembriĝi, ŝanĝis sian opinion, aŭdinte pri la kunlaboro. Wiebren ricevis intertempe la adresojn de 15 esperantistoj el Frislando. Li pretas partopreni en la organizado de kuna jubilea evento de ambaŭ kluboj. Li konsideras renkontiĝon en Frislando (rondveturon per boato) en majo aŭ junio venontjara.

La 6-an de aprilo prelegos *Sylvain Lelarge*. Li estas franco, loĝas en Hago kaj in-

struas lingvojn. Estos tre interese aŭdi pri lia instrumentado. La kunveno komenciĝos unu horon pli frue ol kutime.

Kuba korespondamiko sciigis al Luit, ke en 2008 estos UK en Roterdamo, kio estas ankoraŭ onidiro. La estraro de UEA decidis pri tio nur en aprilo.

Ineke Emmelkamp, kiu prelegos pri Azio la 13-an de aprilo en kunvenejo Dennenheul (apud Harderwijk) dum renkontiĝo de esperantistoj vidhandikapitaj, kunportis libron kun ciferaj ludoj. Tiaj ludoj nomiĝas *naŭ-opumoj* aŭ *sudokoj*. La libro asertas, ke temas pri ciferaj ludoj amuzaj. Luit opinias, ke tiu epiteto estas kontestebla. Kvankam inter la ĉeestantoj estas pluraj 'saĝuloj', neniuj el ni sukcesis solvi la enigmon.

Dank' al Tiny Bulk, kiu provizis nin per gratulkarto, ni ĉiuj subskribis tiun por Ans Bakker pro ties venonta naskiĝtago.

la 9-a de marto 2006

Ni ĉeestis sesope, inter kiuj estis Luit, kiu regalis nin pro sia naskiĝdatreveno. Voĉlegitaj estas du antaŭaj protokoloj, post kio ni iom diskutis pri kelkaj gramatikaĵoj en ili.

Estis letero de Anne Höpken kaj fotoj pri nia vizito al Oldenburgo, gazeteto de Paul Borggreve, gazetartikolo pri studenta vojaĝentrepreno kun la nomo *Ferio* kaj invito el Bremeno kunfesti ilian jubileon la 28-an de oktobro.

Ni decidis sendi 100 eŭrojn al *Leerstoel Amsterdam* por la Esperanto-lekcioj.

Restis ne multo da tempo por la temo de la vespero: *spritaĵoj*. Luit havas multajn korespondamikojn dise en la mondo. Li petis de ili sendi ŝercojn, el kiuj ni aŭdis kelkajn el Sud-Afriko, Kubo kaj Brazilo.

Estis amuze!



Luit korespondas...

Antaŭ pluraj monatoj mia korespondamiko Josefo sendis al mi tre detalan manuskripton pri siaj travivaĵoj. Mi opinias, ke partojn el tiu manuskripto legu ne nur mi. La pasintajn jarojn venis al Nederlando multaj eksterlandanoj, interalie de Afriko, esperante, ke ili povos vivi ĉi tie en paco. Aliaj petis azilon en aliaj, ofte forraj kaj fremdaj landoj. Mia amiko Josefo estas kongano, kiu vivas nun kiel rifuĝinto en Sud-Afriko. Ĉu la situacio en lia patrujo estas ankoraŭ tia, ke li ne povas reiri hejmen?



En *Dagblad van het Noorden* de la 7-a de januaro 2006 mi legis artikolon pri la Demokrata Respubliko Kongo. Dum la pasintaj jaroj oni aŭdis aŭ legis pri tiu lando ne multon. Pli ofte oni raportis pri la malagrabra situacio en pluraj aliaj afrikaj landoj. Multaj homoj mortis, mortas kaj mortos pro perfortaĵoj, malsanoj, malsatego kaj manko de (bonkvalita) akvo. Ĉu tio signifas, ke en Kongo tiaj problemoj ne plu estas? Kontraŭe! La titolo de la ĵurnala artikolo estas jena:

Krizo en Kongo la plej mortiga en la mondo en sesdek jaroj. Kaj la subtitolo ne es-

tas pli ĝojiga: *Humaneca katastrofo en disŝirita lando.* Ĉiutage mortas en Kongo proksimume 38.000 homoj pro febro, diareo, malario kaj spiradafekcioj, sed ankaŭ pro subnutrado. La mortokvanto en Kongo estas 40 procentoj pli alta ol en aliaj afrikaj landoj. En 1998 ekfuriozis en Kongo milito, kiu oficiale finiĝis en 2002. Sed precipe en la orienta parto de la lando estas ankoraŭ multaj la perfortaĵoj inter la diversaj (armeaj) korpusoj, popolarmeoj, ribeluloj kaj friponaj hordoj. La nombro da viktimoj en la pasintaj ok jaroj estas kvar milionoj. Pro la danĝera situacio fuĝis multaj flegistoj. Hospitaloj ne plu funkcias kaj medikamentoj ne plu estas liverataj. En Kongo estas 17.000 soldatoj de Unuiĝintaj Nacioj, sed la nombro ne sufiĉas por garanti la sekurecon en la tuta lando. Precipe en sudorienta regiono Katanĝa la situacio estas ankoraŭ katastrofa.

La historio de Kongo (kvaroble pli granda ol Francio) estas riĉa je konfliktoj. Ankaŭ en 1996-97 jam estis milito en Kongo. S-ro Kabila, helpate de la armeo de la najbara lando Ruando (Kongo kaj Ruando estas iamaj kolonioj de Belgio), gvidis grandan militon per kiu li perforte anstataŭis la malnovan kongan diktatoron Mobutu, kiu jam regis dum pli ol tridek jaroj. Unu jaron poste, dankinte la ruandan armeon, Kabila ordonis, ke ĉiuj ruandaj militistoj forlasu Kongon. Sed Ruando preferis daŭre ludi rolon en Kongo kaj ekokupis perforte kvin provincojn de la D-R-Kongo.

Demokratia Respubliko Kongo estas la plej riĉa lando de la afrika kontinento pro multaj mineraloj. Multaj landoj (ne nur afrikaj) jam klopodis profiti la riĉaĵojn de Kongo. Tiuj riĉaĵoj fakte estas la kaŭzo de la katastrofa situacio. Temas interalie pri

oro, diamanto, kupro, tantalio, uranio, petrolo, arbaroj, specialaj bestoj, ktp.

Post kiam s-ro Jean-Pierre Bemba (iama belga studento) kun siaj ribeluloj ekteroris la nordon de Kongo, ankaŭ Ugando enmiksiĝis. Ruando kaj Ugando neglektis peton de la internacia komunumo retiri sin el Kongo, ĉar ili opiniis, ke necesas defendi siajn landojn kontraŭ la ribeluloj, kiuj havas siajn bazojn en Kongo. Poste ankaŭ burundaj militistoj okupis parton de Kongo. La etna popolo de orienta konga provinco Kivu (1% de la konga popolo) antaŭe jam planis okupon de la tuta lando kaj ankaŭ ili decidis partopreni ĉi tiun militon. La kivuanoj estis helpataj de militistoj de la tri okupantaj landoj. Anoj de la aliaj kongaj popoloj kolektiĝis en milita grupo, nomata Mai-Mai.

La ĉefa registaro de Kongo, kiu posedis tiam nur trionon de la lando, kaj kies armeo plejparte ribeliĝis, petis helpon de aliaj landoj. Tiel ankaŭ Zimbabvo, Namibio, Ĉadio kaj Angolo enmiksiĝis. Kelkaj el la enmiksiĝintaj landoj batalis unu kontraŭ la alia sur konga teritorio.

Mia amiko Josefo vivis en Bukavu, en la provinco Kivu, kie li studis ĉe universitato. Bukavu situas proksime al la landlimoj de Ruando, Ugando kaj Burundo. La regionon, en kiu situas Bukavu, perforte okupis ribelantoj subtenataj de tiuj tri landoj. La loĝantoj de Bukavu, kiuj ne apartenis al la Kivu-popolo, plurfoje manifestacie protestis kontraŭ la perforta okupado. Ankaŭ la studentoj partoprenis en tiuj manifestacioj. Josefo pri tio skribas:

Dum mia restado en la lernejo ĉiuj studentoj devis partopreni ĉiujn manifestaciojn. Tamen estis tre danĝere ĉeesti tiajn eventojn, ĉar ofte studentojn mortigis la tiama registaro de la okupantoj. Se necesas kalkuli, ni manifestaciis pli ol dudek fojojn.

Mi rakontos al vi pri la plej granda, en kiu mortis dek du studentoj.

Pro la rifuzo de la okupanta registaro subskribi la packontrakton, pri kiu interkonsentis delegitoj de la konga registaro kaj de la okupanta partio, la loĝantaro seniluziĝis. La senarmilaj studentoj decidis manifestacii kaj tiel devigi la okupantojn subskribi la pacinterkonsenton.

Meznokte la studentoj disvastiĝis en la urbon kaj konstruis barilojn por malebligi la alveturon de la okupantoj, por ke ili ne intervenu. La manifestacio nepre estu paca. La studentoj konsideris sin batalantoj intelektaj. Kiam mateniĝis la studentoj estis je la interkonsentitaj lokoj. La tuta urbo estis silenta: lernejoj, entreprenoj kaj oficejoj ne funkciis, ne estis trafiko en la stratoj. Timante la reagon de la okupantoj, gepatroj konsilis siajn gefilojn resti hejme. De malantaŭ la fenestroj ili observis la kantantajn pretermarŝantajn studentojn. Je multaj vojkruciĝoj ili bruligis pneŭojn. Fumo kaj odoro dominis ĉie.



Ĉiuj timis escepte de la studentoj, kiuj ĝojis pri la sukceso de la evento. Sed kio estas sukceso? Estis klare, ke ankaŭ la okupantoj opiniis la manifestacion sukcesa kaj ili decidis kontraŭbatali la studentojn.

Ankoraŭ antaŭ tagmezo la okupanto rapidsendis soldatojn por disigi la studentojn kaj perforte forpeli ilin de la stratoj. Tiam la situacio katastrofiĝis.

En multaj stratoj ekaperis soldatoj kun pafiloj kaj bastonoj en la manoj! Ne plu temis pri paca planita manifestacio, sed de tiam temis pri danĝera militeto. Nur unu partio havis armilojn, dum la alia nenion havis. Dise en la urbo aŭdiĝis bruoj de pafadoj. Ni estis ĉirkaŭataj de armitaj soldatoj. Kion ni faru? Kien ni iru? Kia solvo restos al ni? Kiu savos nin? “Nur Dio povos savi nin.”, respondis amiko.

Ni esperis trovi rufiĝejon en ies ajn domo, sed tio ne plu eblis, ĉar la timigitaj loĝantoj fermis siajn domojn. Restis al ni nur la eblo kurante fuĝi for de la soldatoj, kiuj emis mortigi ĉiujn, kiuj vidiĝas en la stratoj. Bruoj de pafado daŭrigis, kaj la urbo ŝajne iĝis preskaŭ senhoma. Ĉiuj fenestroj estis fermitaj. Trairante la stratojn, ni vidis mortigitajn kaj vunditajn homojn. Unu el tiuj vunditoj estis knabino. Ĉar la soldatoj daŭrigis la pafadon, ni tre singarde proksimiĝis al la ĝemanta knabino. “Estas Roza”, elkriis mia kunulo Paŭlo. Ankaŭ ŝi estas studento, nia samklasa amikino kaj filino de profesoro.

Proksimiĝante al la knabino, ni tre timis, ĉar la soldatoj agis plu. Roza kuŝis en lageto da sango, kaj apud ŝi estis du mortigitaj homoj, virino kun sia bebo.

Ni nepre zorgu pri Roza. Ĉar ni antaŭenirus nur malrapide, se ni portus ŝin kune, tial Paŭlo proponis, ke unu el ni portu ŝin sole. Ni decidis, ke mi portos ŝin, kaj Paŭlo iros kelkdekajn metrojn antaŭ ni por esplori ĉu en la trairontaj stratoj ne estas soldatoj. Nia ideo estis iri al la studejo, kien ne eniras la soldatoj. En la studejo estas studentoj de la medicina fakultato, kiuj povos ekzameni kaj flegi Rozaon.

Post minutoj da silento kuglopafado denove ekaŭdiĝis. Ni rapidigis niajn paŝojn. Subite mi sentis en mi tondrobaton kaj terenfalas. Mi perdis la konscion, same kiel Roza.

Pri tio, kio okazis poste Paŭlo rakontis al Josefo en hospitalo. Soldatoj en branĉostrato vidis Paŭlon, kiam li transiris vojkruciĝon rapidegante al apuda strato. Antaŭ ol li povis averti Josefon, la alvenintaj soldatoj vidis Josefon kaj tuj aŭdiĝis bruoj de iliaj pafiloj. Josefo estis trafita de pluraj kugloj, kaj li terenfalas. Tamen li estis bonŝanca, ĉar la soldatoj verŝajne opiniis, ke li kaj Roza estas mortaj. La soldatoj pro tio ne plu atentis siajn viktimojn.

Paŭlo vidis tion, kio okazis kaj intencis iri al siaj kamaradoj por helpi ilin. Sed tuj aŭdiĝis virina voĉo de el fenestro: “Ankaŭ vi mortos! Venu, eniru mian domon!” Ĉar Paŭlo iom hezitis, la virino rapide eliris kun sia edzo, kaptis Paŭlon kaj perforte enirigis lin en sian domon.

Nur kelkajn minutojn poste preteriris la domon aro da soldatoj serĉantaj la fuĝanton.

La grave vunditaj Josefo kaj Roza kuŝis sur la strato preskaŭ du horojn, kiam venis helpistoj de la Ruĝa Kruco. Ili metis la vunditojn en malgrandan veturilon kaj veturigis ilin al kuracejo. Paŭlo ĉion vidis, sed liaj savintoj malebligis, ke li enmiksiĝas en la aferon.

Ekde la sekva tago la situacio iomete pliboniĝis. La studentoj restis en la studejo, priplorante siajn mortigitajn kaj vunditajn kamaradojn. Pli ol cent vunditoj estis en la hospitalo, kaj dek du studentoj ne postvivis la “pacan” manifestacion.

Dum tri semajnoj ne estis lekcionoj en la urba universitato. La okupantoj subskribis pacan interkonsenton, sed ili ne ĉesigis la militon.

Niaj amikoj kaj kamaradoj vizitis nin

multfoje kaj helpis nin multmaniere. En du semajnoj mi resaniĝis kaj povis forlasi la hospitalon. Mi reiris al la universitato kaj al mia loĝejo. Roza tamen ne jam tute resaniĝis kaj devis resti ankoraŭ en la hospitalo. Kvin tagojn post mia reveno al la universitato la okupantoj de la urbo sekrete eldonis liston de studentoj arestendaj. Sur tiu listo estis ankaŭ mia nomo, kun priskribo de la cikatroj de miaj vundoj.

Dum tri tagoj soldatoj serĉis min kaj finfine kaptis min en la urbo, kiam mi eliris el la preĝejo kaj volis reiri al la universitato. Estis la tago, kiam oni rekomencis la lekciojn, sed samtempe mia lasta tago en la universitato. Nevole mi forlasis miajn amikojn, kaj de tiu tago mi ne revidis ilin. Ĉu mi iam revidos ilin? Kiam? Kie?



Tiel mi iĝis malliberulo. En malliberejo oni estas vere mallibera, oni ne povas fari kion oni deziras fari, oni ne povas iri kien oni deziras iri, oni ne manĝas kion oni deziras,.... Ĉefe, oni ne rajtas deziri. Kiam mi eniris malliberejon, estis por mi la unua fojo esti malliberigita. Tie mi trovis multajn aliajn homojn. Kelkaj el ili estis arestitaj pro krimaj agoj, aliaj pro diversaj kialoj: ŝteloj, mortigoj, ŝuldoj, insultoj je la okupanta partio, ktp. Ĉiu havis paperon, sur kiu estis skribita tiu kialo, sia nomo, siaj naskiĝdato kaj –loko kaj la hejma adreso. La duan tagon oni veturigis nin al alia malliberejo. Ĉi-lastata estis pli suferiga ol la unua. En la dua ne plu estis

homoj kun kialoj de la unua. Tie estis malliberigitaj nur kaptitaj soldatoj de la malamika partio, ĵurnalistoj kaj ni, studentoj. Ĵurnalistoj estis malliberigitaj, ĉar ili raportis pri rompadado de homaj rajtoj, pri kiu respondecas la okupantoj. La kialoj pri la studentoj ne estis precizaj. Ni restis tie tre suferaj.

Kutime oni donis al ni nur unu tason da fazeoloj kaj unu alian da akvo por la tuta tago. Dum ni manĝis, la soldatoj kutimis insulti nin. Por ne esti mortigita oni ne reagis al tiuj insultoj.

Ĉiajn suferigojn, kiujn ni elportis, mi ne kapablas citi tie ĉi, sed mi diras nur, ke neniam mankis la bastona puno.

La malliberuloj ne estis esplordemanditaj, ankaŭ ne post kiam ili tion petis. Iun tagon vizitis la malliberulojn la estro de la okupo-partio por klarigi al ili la situacion. La malliberejo estis rezervita por ideologiaj malliberuloj, homoj kun ideoj malaj al tiuj de la okupopartio. Oni restos en la malliberejo, ĝis ŝanĝiĝos tiuj ideoj. Por atingi tion oni havis strategion. Suferego estas adekvata maniero por ŝanĝi ideojn. Tendo per promesitaj riĉaĵoj estas alia eblo. Tria maniero estas semi disecon: “Ju pli malkonkordaj estas viaj malamikoj, des pli ebla estas via venko”.

Laŭ la estro jam forlasis la urbon ĉiuj opoziciaj politikistoj, timante la soldatojn de la okupopartio. “Niaj soldatoj fieras kapabli ĉion ajn kaj faras kion ni al ili ordonas”. La estro eksplikis, ke ĉiu malliberulo mem povas decidi pri sia estonto. Depende de sia decido li estos en la malliberejo nur tempon mallongan, longan aŭ eĉ la tutan vivon. La decido estas simpla: oni ja aŭ ne aliĝos al la partio. Kiu aliĝos al la partio militos en la suda arbaro de Kongo, kiu rifuzos aliĝi, tiu mortos. Post tiu klara ekspliko foriris la estro kaj lasis al la aŭskultantoj kelkajn semajnojn por pripensi sian estonton.

La karcero, en kiu ni travivis kelkajn tre malagrablajn semajnojn, estis samtempe manĝejo, dormejo kaj necesejo. Neniu rajtis viziti nin, escepte pastoro. Por akiri vizitpermeson la pastoro elspezis grandan monsumon. Malgraŭ tio li rajtis resti nur dek minutojn. Dum la vizito la pastoro sukcesis kaŝe transdoni al mi leteron. La soldatoj interrompis nian komunan preĝon kaj ili devigis la pastoron foriri.

La leteron sendis al mi s-ro Ferdinand Vince de Saint-Nazaire (Francio). Mi demandis min "Kiu estas tiu sinjoro?" Montriĝis, ke ĝi estas respondo al mia peto de SAT-Amikaro sendi al mi materialon por Esperanto-instruado, kiun mi ĵus komencis en Bukavu. S-ro Ferdinand Vince sciigis al mi, ke mi baldaŭ ricevos la petitan materialon. Tiu letero iĝis al mi ege grava, kaj mi opinias, ke mi neniam forgesos la nomon de tiu sinjoro.

Kelkajn tagojn poste venis partiestro por intervjui nin pri tio, kion ni decidis: militi aŭ morti. Ĉiuj elektis iĝi partiano kaj militi, escepte de du amikoj kaj mi. Ni trioje rifuzis elekti kaj diris, ke ni militos neniam.

La "novajn partianojn" oni malliberigis, sed Josefo kaj liaj amikoj devis resti en la ĉambreto. Oni diris al ili, ke ili estos mortigitaj la sekvontan tagon. Post malagrabra nokto oni veturigis ilin al la haveno de Uvira. Per boato oni veturigis ilin al militeja tendaro en la apuda provinco Sude. Tiu tendaro estus la mortejo de la tri rifuzuloj.

La motoro de la boato ekfunkciis, kaj ni ekiris. Soldatoj ĉirkaŭis nin. Ni nek moviĝis nek parolis, ĉar ni jam estis duonmortaj. Ni forlasis la Uviran havenon kaj veturis en la direkto de la Suda lago. Meze de la veturo ekventegis, kaj ondoj balancis la boaton danĝere. Post duona

horo ĝi renversiĝis. La soldatoj kaj ni eksterŝipiĝis en la lagon. La distanco inter ni kaj la lagobordo estis du kilometroj. Kelkaj soldatoj surhavis pezajn surhavaĵojn kaj pro tio ili tuj subakviĝis kaj mortis. Miaj amikoj kaj mi estis nudaj. Tial ni naĝis facile kaj atingis la lagobordon unue. Rimarkinte, ke la soldatoj estas je distanco de ĉirkaŭ cent metroj, ni rapide malaperis en la arbaron. Tiel ni liberiĝis.

Ni troviĝis en arbaro, granda arbaro, kie vivas malafablaj kaj hommanĝantaj bestoj. Sed, malgraŭ la danĝero de la arbaro, ni ŝatis resti en ĝi, ĉar reveni en la urbon estus pli danĝere. Fakte, la partio de okupantoj tiam mortigus nin tuj. Pro tio ni dum tri semajnoj restis en la arbaro, manĝante kaj trinkante kion la arbaro prezentis al ni. Finfine ni atingis la vilaĝon Mboko. Tiu estis la komandejo de la Maimai. Maimai estas militistoj, kiuj vivas en la arbaroj kaj vilaĝoj ĉirkaŭ lokoj de okupantoj. Ilia grupo konsistas el viroj kaj virinoj, kiuj decidis venĝi la senkulpan popolon. Ili batalas kontraŭ siaj malamikoj ne nur per kutimaj rimedoj, sed ankaŭ per magiaj misteraĵoj.

Josefo kaj liaj du amikoj aliĝis al la Maimai. En Mboko ili loĝis ĉe knabo, kiu estis en la sama universitato kiel Josefo, kaj kiu intertempe fariĝis kvartala grupestro de la vilaĝo. Mboko tiam jam estis granda, riĉa kaj tre prospera vilaĝo aŭ burgo, kun kvin kvartaloj. Dum tuta monato ili restis hejme, dum aliuloj iris militi kontraŭ okupantoj, fiŝkaptis aŭ okupis sin pri aliaj farendaĵoj.

Meze de la dua monato, ĉiuj viroj kaj knaboj devis iri militi en Uvira, kie ni trapasis. Ni ne sciis militi kaj klopodis tion klarigi al ili, sed vane. Iun vesperon ni ekiris al la batalejo. Ili donis al ni armilojn, sed

ni rifuzis. Ili diris tiam: “Vi devas elekti; aŭ iri, aŭ ne iri kaj morti.” Rapide ni akceptis. Ili tiam diris, ke ni ne havos pafilojn en la milito, sed nur ŝarĝojn sur ni kaj tiel helpos la militistojn. Ili diris ankaŭ, ke nia okupo estos sperti la militon, ĉar por iĝi bona militisto oni bezonas sperton kaj alkutimiĝon. Ni iris nokte, marŝadis pli ol kvindek kilometrojn, ĝis ni atingis la tendaron de la okupantoj. Estis la kvara frumatene. Apud la tendaro ni haltis. Kvankam estis ankoraŭ mallume, soldato de la malamika partio vidis homojn, kaj laŭte kriante, li anoncis tiun malkovron. Liaj kolegoj vekiĝis, kaj tiel la batalo komenciĝis. Se Dio ne estus defendinta nin, ĉiuj miaj amikoj kaj mi estus mortintaj, ĉar, unue ni ne havis armilojn, due ni rifuzis preni la magian aĵon por ne morti per kugloj, bombo aŭ tranĉilo, kaj por malaperi vid-al-vide de malamiko, ĉar ni estas kristanoj, kaj nia religio malpermesas uzadon de magio. Trie ni neniam militis antaŭe. La milito daŭris la tutan tagon, ĝis la okupantoj fuĝis vespere. Ni nenion faris krom rigardi la scenon. Tiel la Maimai okupis la malamikan tendaron, kiu situis ankaŭ en arbaro.

La sekvan matenon oni devigis nin enterigi ĉiujn mortintojn de la Maimai. Ili perdis pli ol cent batalantoj. Laŭ ordono de la maimai-a batalestro ni ne zorgu pri la mortintoj malamikaj, kies nombro da viktimoj estis kvinobla. Laodoro de la morto estis abomeninda.

Iun vesperon oni ordonis al Josefo kaj al liaj amikoj prizorgi la kuiradon. Ili akceptis la laboron kaj tuj komencis. Ili laboris bonhumore. Dum la laborado, kiam jam estis la oka vespere, ili diris inter si: “Ni iru unu post la alia kaj tiel ni malaperu. Rendezuo ĉe la rivero.”

Tiel ili agis kaj nevidataj ili forlasis la tendaron. Post ilia foriro aŭdiĝis multaj pafoj de kugloj dise en la arbaro. La Maimai

sendube serĉis ilin.

Ni trairis la arbaron kaj ne haltis antaŭ ol ni atingis la lagon. Ni tute ne atentis la eventualan ĉeeston de sovaĝaj bestoj. Atinginte la lagon, ni unue dankis Dion, ĉar ni estis en la milito, sed tamen nek mortis nek mortigis. Kien ni iru nun? Ĉar ĉiuj partioj mortigus aŭ kaptus nin, restis nur unu solvo: iri en fremdan landon. En kampo ni vidis civilan vilaĝanon kaj ni decidis peti helpon. Ni diris al li ĉion pri nia problemo, restis kun li la tutan tagon, kaj li promesis veturigi nin nokte per sia pirogo en fremdan landon. En la fremda lando, Tanzanio, ni decidis disiĝi, por ke la polico ne rimarku nin, ĉar neniu el ni havis pasporton. Ni interkonsentis pri renkontiĝo en Dzaleka, kie estas tendaro por rifuĝintoj.

Post kiam Josefo forlasis sian patrujon, komencis por li longa vagado tra pluraj fremdaj landoj. Dum kelkaj monatoj li loĝis en vilaĝeto Muzi, kies loĝantoj scipovis nek legi nek skribi. Neniu misiisto ilin vizitis. Pri modernaj religioj ili scias nenion. Kun la muzianoj Josefo loĝis en paco, kaj ili respektis unu la alian. Sed la diferenco inter moderna urbo kaj arbara vilaĝeto estas granda. Kompreneble, Josefo ne povis resti tie, kaj post kelkaj monatoj li devis adiaŭi siajn novajn amikojn kaj daŭrigis sian vagadon. Nun li loĝas provizore en Sud-Afriko. La vivocirkonstancoj por homoj kiel Josefo ne estas kontentigaj, kaj li povas esperi nur, ke la estonto tenas ankaŭ por li ion bonan en rezervo.



(ensenditaĵo)



Ateliero pri Esperanto ĉe UvA

Laŭ invito de Studenta Asocio pri Ĝenerala Lingvistiko VOS okazis la 15-an de marto ateliero pri Esperanto en la Universitato de Amsterdamo.

Tiam docento Wim Jansen resume prezentis faktojn rilate al Esperanto, Andreo Cseh kaj ties metodo. Sekvis provleciono laŭ la rekta metodo gvidita de Atilio Orellana Rojas. La ĉeestantaro, studentoj de UvA pri diversaj fakoj, vigle starigis demandojn pri la nuntempa uzado de Esperanto, denaskuloj, eblecoj de disdialektiĝo, ktp.



Wim Jansen

Ĉi-speca ateliero pri Esperanto okazis ĉe UvA la trian fojon, kaj konstatablas la daŭre kreskanta interesiĝo pri la fenomeno Esperanto, ne nur pro la nombro de ĉeestantoj, sed ankaŭ pro la videbla preteco science pridiskuti la utiligon de lingvo, kia Esperanto.

Atilio Orellana Rojas

ESPERANTO NOORD-NEDERLAND
T.W.S. Mansholtstraat 25
9728 MC GRONINGEN



ESPERANTO - taal zonder grenzen